# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Por la plej brila sukçeso de nia XVI-a.
Venu al Vendrell dum 4 - 5 - 6.
de proksima Junio!

(Vidu detalojn sur p. 33, 34, 35, 36, 37.)

MAJO-JUNIO 1933 N-ROJ 194-195

No és cap secret per a ningú que

**L'ESPERANTO**

pot ésser conegut sols en

**VINT LLIÇONS**

Però cap sistema d'ensenyament dóna millors resultats que el

**Mètode CSEH**

de reconeguda fama en el moviment esperantista mundial

La Federació Esperantista Catalana pot facilitar l'organització d'un curset d'Esperanto per mitjà d'aquest mètode, en les localitats on 25 persones, com a mínim, vulguin aprendre'l.

**Demaneu condicions a la redacció d'aquesta revista**

MAJO-JUNIO 1933 N-ROJ 194-195




# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:
Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:
València, 245-BARCELONA

## VENDRELL ATENDAS VIN!

### VETURU GRANDNOMBRE AL LA SCENEJO DE NIA XVI-A. KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO KAJ DE LA XV-AJ INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Grandan sukceson ni esperas atingi en niaj festoj dum proksima Pentekosto. La kataluna samideanaro certe deziras denove sin revidi, depost tiom da jaroj de hejmrestado, de neĝuita esperantista interrilato.

La klopodo kaj entuziasmo de niaj amikoj el Vendrell, la kara kongresloko, estas ĉiutage tiom grandaj, ke baldaŭ ilia urbo estiĝos neestingebla esperanta fajrujo en Katalunujo. Kvar kursoj de Esperanto funkcias en diversaj kultursocietoj de Vendrell. Pli ol 60 personoj enskribiĝis por la Cseh-kurso jam antaŭ la okazigo de la kutima provleciono.

Restas nur al la cetera samideanaro alveturi grandamase al Vendrell, la deksesa kataluna urbo, kie ankaŭ dum kelkaj tagoj svarmos malgranda parto de tiu popolo nomata Esperantujo.

*Ĉiu devas montri per ĉeesto al la Kongreso, ke Esperanto vivas en la koro kaj lipoj de multaj kaj multaj personoj.*

**ĈIUJ SAMIDEANOJ AL VENDRELL DUM LA 4, 5, 6 DE PROKSIMA JUNIO!!!**

## IOM PRI VENDRELL

Vendrell estas la dua plej grava urbo de la kataluna departemento aŭ regiono nomata Penedés. Ĝia loĝantaro nombras 5.000, kaj proksime de la urbo etendiĝas la belaj apudmaraj kvartaloj Comarruga kaj Sant Salvador. Vendrell estas trairata de diversaj vojoj, inter ili la ĉefvojo de Barcelono al Valencio, ĉu tra Vilafranca kaj Molins de Rei aŭ tra Vilanova kaj Sitges. Ambaŭ ĉefvojoj ligas Vendrell al Barcelono per la distanco de 68 kilometroj, kaj al Tarragono, survoje al Valencio, per 29 kilometroj.

La terkulturado de la Vendrell'a kamparo estas unu el la plej fruktodonaj en nia lando. Abundaj estas la rikoltoj de vinberoj, olivoj, karoboj, tritiko, migdaloj, legomoj, k. c. Rimarkinda ankaŭ estas la fabrikado de alkoholo kaj aliaj produktoj.

La situo de Vendrell estas admirinda pro la proksimeco de la maro kaj montaro, kiu ĉirkaŭas la nordokcidentan parton de la urbo, de kie oni facile vidas la altiĝantajn Montmell kaj Montagut. Kelkajn kilometrojn malproksime troviĝas la famaj monaĥejoj Santes Creus kaj Poblet, kies mirindajn arkitekturaĵojn havos okazon admiri niaj kongrespartoprenontoj dum la lasta tago de nia Kongreso.

Kelkaj nomoj de altmeritaj homoj honoras la urbon Vendrell, ilia estimata naskiĝloko. Ramon Vidales, Jaume Carner, sperta advokato kaj ekonomiisto (nuntempe financministro de la Hispana Respubliko); Pau Casals, komponisto, mondkonata violonĉelkoncertisto; Angel Guimerà, la nacia kataluna poeto, kiu, kvankam naskiĝinte en Kanarinsuloj, pasigis sian tutan infanecon en Vendrell.

## XVI-A. KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO.
## XV-AJ. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ.

*Gvidado:* Kataluna Esperantista Federacio.

Prezidanto: Sebastià Alberich; Vicprezidanto: Joan Gili Norta; Sekretario: Josep Alberich; Vicsekretario: Vicenç Andrés; Kasisto: Jaume Herp; Kalkulisto: Manuel Rodellar; Bibliotekisto: Eduard Capdevila; Voĉdonantoj: Jacint Comella kaj Josep Banet.

*Aranĝo:* K. E. F.—Delegacio el Vendrell.

Prezidanto: Francesc Guitart; Vicprezidanto: Jaume

Marcè; Sekretario: Salvador Esvertit; Vicsekretariino; F-ino. Maria Julivert; Kasistino: Hermínia Romeu; Voĉdonantoj: Sroj. Joan Constantí, Lluís Corbella, Salvador Martorell, Ferran Ramon, Carles Soler, kaj Salvador Urpí.

*Juĝantaro de la Internaciaj Floraj Ludoj.*

Prezidanto: Artur Domènech Mas; Sekretario: Jaume Grau Casas; Voĉdonantoj: F-ino. Maria Julivert, Manuel Rodellar, Ramon Soler.

## PROGRAMO

*Unua Tago:* 4. Junio 1933.

10'50. Alveno de la gekongresanoj.

11'30. Akcepto ĉe la Urbodomo.

12'—. Malferma kunsido de la Kongreso. Parolado de la Prezidanto de K. E. F. Salutado de la delegitoj.

13'—. Inaŭguro de la Propaganda Ekspozicio ĉe "Centre Industrial".

15'30. Solena okazigo de la Festo de la Floraj Ludoj ĉe "Centre Vendrellenc".

18'—. Malkovro kaj inaŭguro de "Strato Dro. Zamenhof".

22'30. Balo honore de la gekongresanoj.

*Dua Tago:* 5, Junio 1933.

10'—. Esperantaj ekzamenoj de profesoreco kaj kapableco.

11'—. Labora Kunsido de K. E. F. ĉe "Biblioteca Popular" (Kongresejo) laŭ la jena tagordo: Raporto de la Sekretario; Aprobo de la bilanco ĝis 31. de Majo 1933; Agado kaj sinteno de K. E. F. ĉe la proksima kunveno de delegitoj de Hispana Esperantista Konfederacio; Aliĝo al la Universala Federacio Esperantista; Okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono; Diskuto de prezentitaj proponoj; Eventualaj petoj kaj proponoj (se tempo sufiĉos); Elekto de nova Komitato de K. E. F. kaj de venonta Kongresurbo.

13'—. Oficiala Festeno de la Kongreso.

16'—. Ferma kunsido de la Kongreso.

18'—. Prelego de F-ino. Elinjo Pähn kun lumbildoj ĉe la Kongresejo (Biblioteca Popular).

*Tria Tago:* 6. de Junio de 1933.

8'—. Tuttaga ekskurso al la famaj monaĥejoj Santes Creus kaj Poblet.

17'20. Forveturo kaj adiaŭo de la gekongresanoj.

## DIVERSAJ FESTOJ OKAZE DE LA KONGRESO

La 4. de Junio, Sro. Jaume Grau Casas faros propagandan poresperantan paroladon ĉe "Cooperativa Obrera La Reforma" pri la proleta esperanto-movado.

La 5. de Junio, la esperantistaj katolikoj el Vendrell aranĝos meson kun esperanta prediko, kiu okazos je la 9-a. matene. Diservos pastro J. Font Giralt, kaj faros la predikon pastro Frederic Martí Albanell. En la sama mateno okazos ankaŭ kunveno de esperantistaj liberpensuloj, kaj tagmeze oni okazigos la amuzan vermuton de la "Okulvitruloj".

## HORTABELO DE VAGONAROJ INTER BARCELONA KAJ VENDRELL

*Forveturo de Barcelona:* 4'53; 6'58; 8'48; 12'38; 16'18; 17'51.
*Alveno al Vendrell:* 7'31; 9'17; 10'50; 14'39; 18'27; 19'49.
*Forveturo de Vendrell:* 6'42; 8'04; 10'49; 13'32; 17'26; 19'03.
*Alveno al Barcelona:* 8'51; 10'04; 12'46; 15'26; 19'24; 21'21.

*Noto:* Ni devas atentigi, ke la Oficiala Vagonaro, kiu alvenos al Vendrell je la horo difinita en la programo, forveturos de Barcelona je la 8'48 de la tago 4. (dimanĉo). Tiu ĉi vagonaro atingas la stacidomon de Passeig de Gràcia je la 9'00. La prezo de la vojaĝo ĝis Vendrell estas 4'—, pesetoj en triaklaso, proksimume. Ni rekomendas al la partoprenontoj de nia Kongreso uzi la supreditan vagonaron.

## HOTELOJ

*Hotel del Centre:* Taga pensiono, 10 pesetoj. *Fonda del Comerç:* 9 pesetoj. *Bar del Sol:* 9 pesetoj. *Kik-Bar:* 8 pesetoj. *Bar del Pi:* manĝoj laŭ la karto. *Fonda Ideal:* prezo nemontrita. *Restaurant Pigallo:* nekaraj manĝoj.

## KONGRESAJ SCIIGOJ

*Kongresa insigno.*—Ĝi estos donacata al la gekongresanoj ĉe la akcepto en la Urbodomo.

*Grupaj standardoj.*—Ni insiste petas al la Grupoj ke ili kunportu siajn standardojn por bone impresi ĉe la alveno kaj por bele ornami la scenejon dum la festo de la Floraj Ludoj.

*Salutado de delegitoj.*—Kiel kutime, delegito de ĉiu esperanta societo salutos la Kongreson dum la Malferma Kunsido, tuj post la parolado de la Prezidanto.

*Akceptejo.*—Ĝi estos instalata ĉe "Centre Industrial", en loko proksima al la Propaganda Ekspozicio. Tie la Kongresanoj povos peti ĉiuspecajn informojn, enskribi sin por la Festeno kaj Ekskurso al Santes Creus kaj Poblet, aĉeti librojn, k. t. p.

*Esperantaj ekzamenoj.*—Por faciligi ilian aranĝon, la ekzamenotoj bonvolu sin anonci ĉe la Akceptejo la tagon de la Alveno.

*Propaganda ekspozicio.*—La Organiza Komitato dankos ĉiujn senditajn esperantaĵojn por la Ekspozicio. Laŭ deziro de la sendintoj, ili estos redonotaj aŭ ne. Ĉion oni adresu al la Prezidanto de la O. K. Sro. Francesc Guitart, Dr. Robert, 46, *Vendrell.*

*Nova strato Dro. Zamenhof.*—Dank' al la sindonemo de la Urbestraro de Vendrell nia Majstro estos ankaŭ honorata en tiu ĉi urbo per strato dediĉita je lia memoro.

*Labora kunsido de K. E. F.*—Nur rajtos partopreni la taskojn de la kunsido la aktivaj membroj de K. E. F., ĉu izolaj aŭ kolektivaj, kaj pagintaj la kurantan nunjaran kotizon.

*Festeno.*—Kiuj deziras ĉeesti la Festenon, tiuj povas jam sin anonci al la Organiza Komitato, kaj devos pagi la koston (12 Ptojn.) ĉe la Akceptejo antaŭ la 14'00 horo de la dimanĉo.

*Ekskurso al Santes Creus kaj Poblet.*—La partoprenontoj de tiu ĉi interesa ekskurso bonvolu ankaŭ sin anonci al la O. K. La kosto de la vojaĝo (80 kilometroj de veturado per komfortaj omnibusoj) estas 6 pesetoj. Oni povos tagmanĝi ĉe Poblet per 5 pesetoj. La kondiĉoj por la enskribiĝo estas la samaj kiel la festeno.

*Aliaj festoj okaze de la Kongreso.*—Post la Oficiala Programo ni presigis liston de ĝis nun konitaj festoj okaze de nia Kongreso. Krom tiuj ĵus cititaj, aliaj estas en preparo.

---

## MI SERĈAS TRADUKANTOJN

*en la nacioj, en kiuj oni legas ĉi tiun gazeton*

Ili devas:

1. esti kapablaj, bonstile kaj elegante traduki artikolojn verkitajn en Esperanto en sian nacian lingvon.

2. Havi bonajn interrilatojn ĉe gravaj gazetoj (ĉiutagaj aŭ periodaj) de sia lando, por instigi ilin al publikigo de artikoloj, kiuj rilatas ekonomiajn, industriajn kaj komercajn aferojn kaj estos laŭ sia enhavo valoraj kaj de publika intereso.

Tiuj samideanoj, kiuj estos pretaj labori kun mi (por entrepreno cetere ankaŭ valora por nia Esperanto-propagando), estas petataj, skribi al mi tre baldaŭ sian adreson, por ke mi povu informi ilin pri mia laborplano, kaj por ke ni povu interrilati pri la reciprokaj kondiĉoj.

Kun samideana saluto.

Prof. Dr. DIETTERLE. Beethovenstr., 19.—Leipzig.

# XV-AJ. INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

VERDIKTO

## ORDINARAJ TEMOJ

*Originalaj Tekstoj.*

I. Originala versaĵo kantanta *Amon*. Natura Floro al la verko n.o 57, devizita *"Nur ami kaj diri la vortojn de l'amo"*. Unua mencio al la verko n.o 41, devizita *"Lia"*, al kiu oni aljuĝas la premion el 50 pesetoj de la Prezidanto de K. E. F. Dua mencio al la verko n.o 5, devizita *"Rememore"*, al kiu oni aljuĝas la premion el 50 pesetoj de la Estraro de K. E. F. Tria mencio al la verko n.o 70, devizita *"Sola"*, al kiu oni aljuĝas la premion el 50 pesetoj de Pastro Joan Guilera. Kvara mencio al la verko n.o 36, devizita "???".

II. Originala *Ama* verko en prozo. Premiita: verko n.o 65 devizita *"La koro ĉiam restas juna"*.

*Tradukitaj Tekstoj.*

I. Esperantigo de fragmento de la tragedio de Angel Guimerà, "Maro kaj Ĉielo" (Mar i Cel). Premiita: verko n.o 66, devizita *"Maŭroj kaj Kristanoj"*.

II. Esperantigo de fragmento de la dramo de Angel Guimerà, "En la Malsupra Lando" (Terra Baixa). Premiita: verko n.o 64, devizita *"Manelik"*.

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

*Difinitaj Temoj*

Premio de "Kataluna Esperantisto". Dumviva abono al la gazeto. Temo: Kiel oni faras bonstilan tradukon. Premiita: verko n.o 2, devizita *"Traduttore, traditore"*. Unua mencio al la verko n.o 25, devizita *"G. N. E. A. T. L."*

Premio de la grupo "Barcelona Stelo", 50 pesetoj. Temo: Studo pri popolkantoj kaj popolkutimoj. Premiita: verko n.o 67, devizita "Estonaj popolkutimoj". Unua mencio al la verko n.o 37, devizita *"Abitur"*, al kiu oni aljuĝas la premion el 50 pesetoj de la gazeto "El Baix Penedés". Dua mencio al la verko n.o 40, devizita *"O. A. M. D. G."*. Tria mencio al la verko n.o 52, devizita *"Per studo al ekkono de l' popolo"*.

Premio de "Dalmau Liceo", 200 pesetoj. Temo: Etimologia klarigo de la diversaj formoj de minimume cent geografiaj nomoj de ĉefaj urboj. Premiita: verko n.o 50, devizita "Historio per vortoj". Unua mencio al la verko n.o 27, devizita *"Buenos Aires-Vindobona"*.

Premio de Sro. Carles M. García Rodrigo. Artobjekto. Temo: Esperanto, grava ilo ĉe la universaligo de la Juro. Premiita: verko n.o 53, devizita *"Universaligo de la Juro"*.

Premio de la Prezidanto de "Espero Katolika". Dujara abono al la revuo. Temo: Laŭvola, sed religia. Premiita: verko n.o 7, devizita *"Se vi disfendus la ĉielon kaj malsuprenirus"*.

*Libervolaj Temoj*

*Originalaj Poemoj*

Premio de "Casa Mumbrú". Artobjekto. Premiita: verko n.° 15, devizita *"Nuestras vidas son los ríos que van a dar en la mar que es el morir"*.

Premio de "Literatura Mondo". Abono al la revuo dum la jaroj 1932-1933. Premiita: verko n.° 31, devizita *"Laboro kaj konstanteco"*.

*Tradukitaj Poemoj*

Premio de la Urbestraro de Vendrell, 150 pesetoj. Premiita: verko n.° 13, devizita *"Blanka rozo"*.

Premio de Sro. Jaume Carner, Ministro de la Hispana Respubliko, 100 pesetoj. Premiita: verko n.° 61, devizita *"Klio"*.

Premio de "Centre Industrial", 50 pesetoj. Premiita: verko n.° 39, devizita *"Bella matribus detestata (Horacio)"*.

*Originalaj Prozaĵoj*

Premio de Sro. Josep Aixelà, 100 pesetoj. Premiita: verko n.° 47-48-49, devizita *"Amdeklaro, Edziĝo junaĝa..., Facila mongajno"*.

Premio de la Redakcio de "Literatura Mondo". Preter la Vivo, Pilgrimo, de Julio Baghy; Streĉita Kordo, Eterna Bukedo, de K. de Kalocsay; Romaj Elegioj, La Taglibro, de Goethe (ĉiuj bele binditaj). Premiita: verko n.° 19, 21, 22, 23, 24, devizita *"Esperanto, Revemulino, Maro, Verocka, Niksino"*.

Premio de Sro. Pau Casals, Artobjekto. Premiita: verko n.° 62, 63, devizita. *"Eŭterpo, Erato"*.

Premio de "Casa Camadas". Artobjekto. Premiita: verko n.° 69, devizita *"E. P."*.

Premio de "Heroldo de Esperanto". Tutjara abono al la gazeto kaj unu lukse bindita ekzemplero de la verko de Herm. Haefker, "Jarmiloj Pasas". Premiita: verko n.° 42, devizita "El pasinto".

Unua mencio al la verko n.° 68, devizita *"E. P."*. Dua mencio al la verko n.° 55, devizita *"Venĝo de urso-patrino"*.

Premio de la grupo "Paco kaj Amo", 50 pesetoj. Premiita: verko n.° 60, devizita *"Talio"*.

Premio de "Universala Esperanto-Asocio". Unu bela esperanta horloĝo. Premiita: verko n.° 11, devizita *"Blanka korvo"*.

Laŭ la regulo II de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj fariĝas propraĵo de la Konservantaro, kiu zorgos pri ilia publikigo sur "Kataluna Esperantisto" aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Eventuale oni petu al la Redakcio de "K. E." permeson por reprodukto.

Majo de 1933.—Artur Domènech Mas, *prezidanto*. Maria Julivert. Manuel Rodellar. Ramon Soler. Jaume Grau Casas, *sekretario*.

## BENSON UNIVERSALA ESPERANTO-METODO

*Enhavanta kompletan rektan lernolibron ampleksan ilustritan legolibron, universalan multlingvan bildvortaron. — 559 paĝoj, 16 × 22 cm. Tole bindita. Prezo 4 usonaj dolaroj. Eldonita kaj kontraŭ antaŭpago ricevebla nur de Benson School of Esperanto, 719 High Street, Newark New Jersey, Usono.*

Malgraŭ ke de antaŭ kelkaj jaroj ni alkutimiĝis vidi grandajn librojn en Esperanto, la pedagogia verkego de Dro. Benson surprizis nin. Ne estas vana adjektivo sed bela fakto, ke la Universala Esperanto-Metodo de nia usona samideano estas *grandioza* verko.

La kontraŭpaĝa reprodukto estas ioma komprenigo pri la vera vero. Ĝi specimenas paĝon el la vortaro, tria parto de tiu librego, konsistanta el pli ol 300 paĝoj simile ilustritaj. Oni povas konstati per la traduko numerita 7 kiel *fang* aŭ *llot, cotó* kaj *cobrir* estas bonaj katalunaj klarigoj por la vortoj *loto, kotono* kaj *kovri* respektive. Sed estas ankoraŭ pli clokventaj la ilustraj desegnaĵoj kiuj svarmas la Vortaron, la Lecionaron kaj eĉ la Krestomation. Por ĉi tiu rubriko Dro. Benson ankaŭ honorigis la katalunajn esperantaĵojn: efektive li elektis el la *Kataluna Antologio* verkaĵojn de Enric de Fuentes-Solà, Miquel Roger, Isidre Torrents, Ramon Caselles, Josep Grau, Vicenç Blasco Ibàñez, Antoni Durà, Santiago Rossinyol, S. Alberich, Jofré, Apel·les Mestres, Estanislau Pellicer, Angel Ruiz Pablo, Jaume Grau.

Spriton, saĝon kaj heroecon spiras la tuta verko de Benson. Oni povas per ĝi plezure lernadi de eklerno ĝis ellerno la internacian lingvon.

Se iu dubas pri la vivanteco de Esperanto, oni varbos lin tuj per montro de la Bensona Universala Verkego.

Grandan servon al nia movado sprite, saĝe kaj heroe faris nia usona samideano.

Pli ol mil pluaj vortoj konvinkos nian legantaron la specimena Bensona paĝo per kies reprodukto ni ilustras hodiaŭ nian gazeton. D. D.

## SUR EKZEMPLERO DE "KATALUNA ANTOLOGIO" DEDIĈITA AL K. DE KALOCSAY

Al vi poet' senkompara,
kiu kantas kun pasi'
pri la nacio hungara,
pri tutmonda harmoni',
vokas jen per voĉo klara
kataluna poezi':
ĝin alloga trovu vi,
alta poeto hungara.

Al vi estu bela, kara,
KATALUN-ANTOLOGI';
porhungara, porhomara
amo estas ja en ĝi.
Alta, nobla, brila, klara
lingvo, penso, emoci':
kataluna kaj hungara
kaj tutmonda poezi'!

Jaume GRAU CASAS, L. K.

## VERKOJ RICEVITAJ POR LA FLORAJ LUDOJ

*(Fina Listo)*

53, Universaligo de la juro; 54, Ombroj; 55, Venĝo de ursopatrino; 56, Enŝteliĝo; 57-58, Nur ami kaj diri la vortojn de l'amo; 59, Lingvo kaj mondo; 60, Talio; 61, Klio; 62, Eŭterpo; 63, Erato; 64, Manelik; 65, La koro ĉiam restas juna; 66, Maŭroj kaj kristanoj; 67, Estonaj popolkutimoj; 68, E. P.; 69, E. P.; 70, Sola. Kelkaj manuskriptoj ne eniros la konkurson pro malfrua alveno.

Jaume GRAU CASAS, L. K., *Sekretario*

## LASTMOMENTA SCIIGO

### LA GAJNINTO DE LA *NATURA FLORO*

Ni ne povas konigi la nomon de la ĉefpremiito de niaj Floraj Ludoj, ĉar ĝis nun, pro diversaj kontraŭvolaj malhelpaĵoj, la Juĝantaro ne povis kunveni kaj malfermi la kovertojn kun la devizoj. Tamen, ni povas jam antaŭanonci, ke la enviinda gajninto estas el la lando de nia Majstro, t. e., polo.

# ESPERANTO KAJ LA NACIAJ LINGVOJ

## ESPERANTO KAJ KATALUNA LINGVO

### *Prefikso "mal".*

Estus tre interese kompile raporti afinecojn inter nia internacia lingvo kaj ĉiuj naciaj lingvoj. Foje oni povas kredi ke tiu aŭ alia esperantaĵo estas tute kaprica, kaj tamen ĝi estas lingva fakto historia, natura, kiu ankoraŭ vivas en iu aŭ kelkaj naciaj lingvoj preskaŭ samforme kiel ĝi aperas en Esperanto.

En Kataluna lingvo troviĝas vortoj *malfiar-se, malapte, mal(a)-bonança, malagradós, malaptesa, malbé, malcontent, maldestre, malguany,* k. a. ĉe kiuj la prefikso *mal* havas ĝuste la saman sencon kiu Zamenhof enblovis en la Esperantan prefikson *mal.*

Efektive:

| KATALUNE | ESPERANTE |
|---|---|
| fiar-se | fidi |
| malfiar-se | malfidi |
| bonança | bonvetero |
| mal(a)bonança | malbonvetero |
| agradós | agrabla |
| malagradós | malagrabla |
| apte | kapàbla |
| malapte | malkapabla |
| aptesa | kapableco |
| malaptesa | malkapableco |
| bo | bona |
| malbò | malbona |
| content | kontenta |
| malcontent | malkontenta |
| destre | lerta |
| maldestre | mallerta |
| guany | gajno |
| malguany | malgajno |

Kompreneble la prefikso *mal* ne estas uzata en Kataluna lingvo laŭ la sama reguleco kiu faciligas ĝian uzon en Esperanto. Ankaŭ la diritaj katalunaj vortoj laŭ la ĉirkaŭfrazo foje havas alian semantikan nuancon, kiu postulas alian tradukon en Esperanto ol tiu supre citita. Tamen oni povas en Kataluna lernolibro pri esperanto komprenigi kaj sentigi la sencon de la Esperanta *mal* per tiuj katalunaj ekzemploj.

En via nacia lingvo, kara kolego, kiuj vortoj prezentas afinecon impresan etimologian kaj morfologian parencecon al Esperanto?

Delfí DALMAU

## JOHN MABON WARDEN

Mortis en Edinburgo la ĝis nun Prezidanto de la Esperantista Akademio, Sro. John Mabon Warden, merita anstataŭanto de la neforgesebla Th. Cart. Longa malsano portis lin al la lasta ripozejo pasintan 8. de Marto.

Pro la malapero de tiu eminenta esperantisto, Esperanto perdas unu el la plej konstantaj kaj memoferemaj batalantoj. Eksprezidanto kaj Honora Prezidanto de Brita Esperanto Asocio, eldoninto kaj kunlaborinto de Esperanta-Angla *pocket dictionary*, ĉefhelpinto por la eldonado de la Biblio en esperanto, konstanta partopreninto de niaj Univ. Kongresoj, K. t. p.; jen parto de lia merita tasko en la esperanto-movado, tasko, kiu per si mem facile montras kiom valora estis la personeco de Sro. Warden, kies inteligenta agado kondukis lin okupi la Prezidon de nia lingva ĉefinstitucio.

Nian plej profundan kondolencon al liaj familianoj, kaj speciale al la brita esperantistaro.

—Ni devas ankaŭ esprimi nian ĉagrenon al la gesamideanoj, fratinoj Carme kaj Dolors Maymí, el Girona, pro la perdo de ilia estimata patro; kaj al nia delegito en Tarrassa, Sro. Miquel Garriga, kiu estas dolore kortuŝata pro la morto de lia 16-jara filino. Ricevu tiuj gesamideanoj nian sinceran kondolencon.

## EVOLUO JES, SED NE EVOLUIGO!

Kiel malnova samideano kaj Lingva Komitatano, kiel sperta propagandisto, kiel homo kiu parolas dek lingvojn, kies evoluo neniam malebligis lin kompreni ilin eĉ tridek jarojn post la ellerno, mi petegas vin: estu severaj en via decido kaj preferu rifuzi ol aprobi.

Nia komuna vortaro bezonas el la teknikaj vortoj nur tiujn de la ĉiutaga vivo, uzataj ankaŭ de nefakuloj, kaj la "internaciaj" vortoj ne devas esti oficialigataj, ĉar ili tio jam estas per la artikolo 15. Publikigu ni, eventuale, listojn pri la plej uzataj, fiksante tiamaniere ilian ortografion por la nekleraj samideanoj kaj cetere lasu ni ilin vivi ilian vivon ofte mallongan, finiĝantan post apero da nova scienca eltrovo aŭ de nova moda fantazio.

Alimaniere niaj posteuloj en la Lingva Komitato malbenos nin pro la laboro necesa por forigi el la tiutempa "Oficiala Vortaro" centojn da vortoj por aĵoj ne plu konataj, dormantaj sub la sablo de la vera "natura evoluo".

Pensu longe antaŭ ĉiu vorto elektota, por ke ĉiu nova civitano de nia Oficiala Radikaro estu vere mankinta ĝis nun kaj ne ansta-

taŭebla per unu de niaj malnovaj amikoj, kiuj helpis tiel bone nian Majstron, krei siajn nepereeblajn verkojn.

Ne forgesu la Azianojn, tiel malproksimajn de ni, kies Esperanto ankaŭ nature "evoluas". Montru al ili la nepran disciplinon, por ke ne iun tagon, post la venko de nia ideo, la esperantistoj de la Okcidento kaj de la Oriento estu devigataj pridiskuti novan interkontinentan ligvon, ĉar ilia "vivanta lingvo" "evoluinte", laŭ la ĝisnuna sistemo, estiĝis tiel malsimila, ke kunvenante por interkomprena interparolado, ili troviĝis antaŭ nova Babelo Turo!

Enriko FISCHER-GALATI L. K.

## AMOR CAL

La indignació és fàcil—i honorable—
quan als altres jutgem severament,
fuetejant amb còlera implacable
el vici, la disbauxa, el mancament.

Abominar del segle és cosa plana,
del món culpable assenyalant l'afront,
llençant insults sobre l'espècie humana
que es repeteixen des que el món és món.

Però hi ha, germà meu, cosa més fina
que la còlera noble i el furor.
Es—l'estimar: heroïcitat divina
i avui feixuga, mes de gran honor.

Car estimar és perdonar ofenses
—la pietat en tots nosaltres és—;
car estimar és demostrar que penses
que peques com els altres—potser més.

I creure que veurem estupefactes
triumfar Déu en l'home dolçament:
no lluitar contra el Mal amb mots—amb actes.
fer amb bàlsam—no amb cops—el guariment.

Tothom, àdhuc el vil, jutjar voldria...
La terra és plena d'odi i de refús.
Amor ens cal, sols ell pot avui dia
sostenir la creu santa de Jesús!

IVAN VAZOV

Trad. de la "Bulgara Antologio" en Esperanto: *Jaume Grau Casas.*

## BIBLIOGRAFIO

*Manifesto de la sennaciistoj.* Eldonis: Sennaciista frakcio el membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda, Nov-Jorko, 1931.

Neklara, nekomprenebla skribaĵo pri sennaciismo. Plie, jen strangaĵo; ĉu en asocio "sennaciieca" povas esti frakcio "sennaciista"? Ni kredis, ke en SAT estas sennaciista ja la tuto. "Aliel" kiel diras la satanoj, ni estas aliĝintaj al SAT jam antaŭ malmultaj jaroj. Sendepende mem de la celo de la asocio, SAT estas nomo tre malbela: satano signifas membron de tiu asocio, partianon de la sateco kaj loĝanton de la infero. Oni povus esti doninta al la laborema laborista asocio la nomon "Sennacieca Asocio Universala" kaj nun ni havus belan nomon SAU, kiu—en la nuna skismo de la klaskonsciaj (!) laboristaj esperantistoj— estus inda rivalo de SEU. (*Seu* estas mallongigo de "Sovetrespublikara Esperantista Unio).

### DU NOVAJ ESPERANTO-GAZETOJ EN U. S. S. R.

Ili estas "La Nova Etapo" kaj "Anti-religiulo". Bonege redaktitaj kaj presitaj, ili pruvas unu fojon ankoraŭ la lertecon de la sovetiaj samideanoj, almenaŭ de iliaj gvidantoj.

Ni pli ŝatas la formaton kaj aranĝon de "La Nova Etapo" ol tiujn de, por ekzemplo, la revuo "Literatura Mondo" en la *burĝa* kampo. Kaj la lingvajo estas same bona—kvankam same plena de neologismoj—kiel tiu de niaj hungaraj verkistoj.

En la n-ro 1 de L. N. E. reliefiĝas "Ni ne estu surdamutuloj" poemo: "La nigraj kaj blankaj manoj", kritika skizo pri la romanoj de H. J. Bulthuis, verkita de N. V. Nekrasov; "Heine kaj Komunismo", de N. Buĥarin; kaj "La nova sovetia literaturo", de N. Gnedina. En la n-ro 2 estas rimarkindaj: "Oficisto", rakonto de Blasco Ibáñez, el la hispana trad. de Luis Hernández: "Pri la granda geniulo kaj malvastkoncepta filistro" (J. W. Goethe), verkita de L. Averbaĥ; kaj "Ni kreu novan grandan Esperanto-Esperantan vortaron", de N. Hoĥlov.

Pri la du unuaj numeroj de "Anti-religiulo" (duonmonata sciencometodika organo de "Unio de Militantaj Ateistoj" (UMA) ni devas diri, ke ilia teksto estas ekstreme densa kaj, malgrau la unutoneco de la temo, ĉiam plene interesa. Jen la titolo de kelkaj artikoloj aŭ notoj: "La anarkosindikalistoj en la batalo kontraŭ I. P. L.", "Organizo kaj metodiko de anti-religia laboro", "La religio de la mont-hebreoj", "Anti-religia laboro de la Centra Muzeo de Tatario", "Pri la Lenin-etapo de la militanta ateismo" "Kristnasko je la servo de Kapitalo", "La origino de religio", "Internacia ateista movado", "Kontraŭrevolucio sub la standardo de Katolikismo", "La malsukcesinta kanonizo de Paulo Romanov antau la Februara revolucio", "Eklezio en la germanlingvaj rajonoj de Ukrainio (Luterana Kontraŭrevolucio), kaj "Naci-kultura konstruado kaj antireligia fronto.—J. G. C.

## ENLANDA KRONIKO

Barcelona.—La grupo "Juneco" transloĝiĝis al la strato València, 385, kie ĝi posedas vastan etaĝon kun tri balkonoj ĉe la strato. Tiu nova ejo permesas pendigi grandan afiŝon kun la nomo de la grupo ĉe la balkono kaj ankaŭ flirtantan esperantan flagon. Du kursoj de nia lingvo okazas en la nova adreso kun sukceso, kaj dufoje semajne oni okazigas grupajn kunvenojn, kiuj estas multe ĉeestataj.

—Ankaŭ la grupo "Nova Sento" akiris novan ejon, tute sendependan, ĉe la strato Llacuna, 1, kiu situas en la mezo de la laborista kvartalo Poble Nou. Okaze de ĝia inaŭguro Sro. Delfí Dalmau faris paroladon pri "La avantaĝoj de Esperanto por la laboristoj" antaŭ multnombra ĉeesto. Sekvontan tagon, matene, okazis lunĉo, kaj posttagmeze oni aranĝis amuzan literaturan kaj muzikan feston.

Supera kaj elementa kursoj de Esperanto okazas regule kun multaj partoprenantoj.

— Depost la fino de Cseh-kurso, gvidita de la estona samideanino F-ino. Elinjo Pähn, la grupo "Paco kaj Amo" imitinde propagandas. Pasintan 23-an de Aprilo oni okazigis la ĉiujaran Printempan Feston ĉe pinarbaro proksima al Les Planes, kiun ĉeestis preskaŭ 300 personoj, por kiuj oni aranĝis sportajn ludojn, matene, kaj literaturan kaj propagandan feston, posttagmeze.

— Jenan novan komitaton elektis la grupo "Barcelona Stelo". Prezidanto: Eduard Capdevila; vicprezidanto: Manuel Palomera; sekretario: Ramon Moret; vicsekretario: Céssari Borque; kasisto: Alfred Rubio; kalkulisto: Salvador Maurel; bibliotekisto: Josep Garcia; voĉdonantoj: Joan Gili, Josep Riera, Rosa Forment kaj Vicenç Andrés.

Regule funkcias supera kaj elementa kursoj kun sukceso.

Badalona.—Dank' al la klopodoj de U.E.A.—delegito, Sro. Ramon Teixidó, kaj de K. E. F.—komitatano, Sro. Manuel Rodellar, nia afero forte progresas en tiu urbo.

Ĉiusemajne aperas sur la gazeto "El Clamor" kurso de esperanto en kataluna lingvo, gvidata de Sro. Rodellar. Tiu kurso tiom bone funkciis, kaj progresis, ke ĵus oni fondis grupon "Badalona Esperantisto", kiu anoncis ankaŭ esperanto-kurson laŭ la metodo "Linguaphone" kaj sub la zorgo de filio de "Dalmau Liceo" el Barcelona.

La adreso de la novefondita grupo estas Passeig de Pi i Margall, 11, kaj la elektita komitato konsistas el: prezidanto, Ramon Teixidó; vicprezidanto, Manuel Rodellar; sekretario, Josep Brió; vicsekretario, Josep Gatell; kasisto, Gaspar Vilalta; kalkulisto, Jordi Batlle, voĉdonantoj, Ramon Oncins kaj Gonçal Ferrando.

Manresa.—Kurso antaŭ 30 partoprenantoj okazis en la ejo de "Centre Excursionista". Sro. Josep Albagés, nia estimata pioniro, zorgis pri ĝia regula funkciado.

## ESPERANTO KAJ LA GAZETARO

Multaj kaj interesaj artikoloj aperis sur la kataluna ĵurnalaro dum lastaj monatoj. Elstaras kelkaj artikoloj pri "Katalunujo kaj la Lingvo Internacia" sur ĵurnalo "L'Opinió", kiujn ni ŝuldas al la plumo de nia samideano Sro. Jaume Aragai. Ankaŭ sur la sama ĵurnalo aperis laŭdinda artikolo pri la dua lingvo ĉe la popollernejoj, kiun ni devas danki al la samideano kaj instruisto Sro. S. Roca i Rodó.

Sur "El Pla de Bages" el Manresa ofte aperas notoj pri la loka movado kaj pri Esperanto. Sur "El Baix Penedés" el Vendrell ni ĝue legis impresraporton pri la provlecionoj de la Cseh-kursoj, okazintaj en Barcelono. Intereson por Esperanto kaj simpation por al Cseh-instruistino, F-ino. Elinjo Pähn, sentas ĝia aŭtoro, la ĵurnalisto *Icar*. Sur la sama gazeto aperas kurso de Esperanto kaj oftaj sciigoj pri la kataluna Esperanto-Kongreso kaj Floraj Ludoj, kiuj okazos en Vendrell.

Plej rimarkinde estas la propagando por Esperanto kaj la Cseh-kursoj, kiun disvolvigis la ĵurnaloj "La Gaseta de Vic" kaj "Diari de Vic", okaze de anoncita Cseh-kurso por ilia urbo. Artikoloj pri Esperanto, pri la nova instrusistemo, pri la sukcesa kurso (70 partoprenantoj), kaj intervjuoj kun F-ino. Elinjo Pähn preskaŭ ĉiutage aperis sur la paĝoj de la ĵurnaloj kaj gazetoj de Vic. Certe, ĉion ni ŝuldas al Sro. Comella kaj liaj ne malpli fervoraj kunlaborantoj.

### GEEDZIĜO

Sro. Ignasi Martínez kaj F-ino. Concepció Coll Faure, ambaŭ anoj de la grupo "Barcelona Stelo", geedziĝis dum pasinta Marto. Al la nova paro ni deziras prosperon en la nova vivo, kaj gratulojn al ŝia patro, Sro. J. M. Coll, ekskomitatano de K. E. F.

## A. S. CENTRA ESPERANTO-LIBREJO

En la jara ĝenerala kunveno de akciuloj de la Akcia Societo "Centra Esperanto Librejo" en Hago (Nederlando), okazinta la 18 an de Februaro ,la bilanco kaj la konto de perdoj kaj profitoj estis aprobataj kaj la dividendo pri 1932 fiksata je 6 ½ % (antaŭan jaron 7 %). Kiel komisaro estis elektita Sro. N. de Boer.

Konforme al la statuto la kunveno priparolis la dividon de la plia profito kaj decidis donaci 65,23 guldenojn al la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-movado en Genève.

Impremta Comercial - València, 234 - Barcelona

# Esperantistes de parla catalana:

Ens cal la vostra col·laboració per mantenir l'estructuració actual del moviment esperantista.

Adheriu-vos, doncs, a la

# Federació Esperantista Catalana

i a la vegada feu-vos abonat del seu òrgan oficial

# Kataluna Esperantisto

Per a ésser soci de la Federació cal pagar la següent quota:
1'80 pessetes a l'any els federats que pertanyin a un grup esperantista organitzat.
3'10 pessetes a l'any els isolats. (Individus no agrupats).

Subscripció a la revista Kataluna Esperantisto val 3 pessetes a la Península i 4 pessetes per a l'estranger.

Envieu l'import de les quotes per gir-postal o en segells de correus a l'adreça de la Fed. Espta. Catalana:

**Carrer València, 245. - - Barcelona**

*R. Torres Carreras*

*i*

*P. Bosch-Solà*

**RADIOLEGS**

*Passeig de Gràcia, 83*

*BARCELONA*


El pròxim número de

*Kataluna Esperantisto*

serà dedicat a ressenyar el

# XVI Congrés Català d'Esperanto

i els

# XV-aj Internaciaj Floraj Ludoj

que tindran lloc al Vendrell
els dies 4-5-6 de juny vinent

**Llegiu-lo**